

Mi jam dufoje luktis.....

Jam antaŭe mi iom menciis pri SUMOO, la luktado pri Esperanto-legado. Sinjoro HORI Jasuo opinias, ke la esperantistaro ne legas sufiĉe sian belan lingvon – kaj laŭ mi li pravas. Sincerdire: ankaŭ mi ne legas sufiĉe, kvankam ni havas kelkajn da esperanto-libroj. Do, kiam mi aŭdis pri tiu SUMOO dum la UK en Islando, mi iom post iom entuziasmiĝis. Entuziasmiĝo estas unu afero, realigi la lukton estas io alia. Sed, mi aliĝis la septembran luktadon kaj elektis la “Hobiton”, kiu estas laŭ mi libro, kiun fakte ĉiu devas legi (ne gravas en kiu lingvo), sed kiun mi ĝis nun ne legis. Do bona okazo finfine legi ĝin. En la novembra SUMOO mi elektis la evangelion laŭ Marko, ĉar, kvankam estante kristanino en domo kun multaj biblioj, kaj estante edzino de pastoro, mi fakte neniam legas la biblion. Mi komencis per la plej malgranda, kaj krome mi legis *Sensorteco* de Imre Kertesz. Kaj vi ja povas diveni, kiujn librojn mi legos dum la sekvontaj SUMOOj. En januaro la evangelion laŭ Mateo kaj tiel plu...

HORI Jasuo estas tre diligenta homo, kiu verkas daŭre dum la SUMOO-periodo raportojn por la partoprenantoj. En la fina raporto mi konstatis, ke mi bedaŭrinde estas la ununura Nederlandanino – mankas Nederlandano. Mi certe povas rekomendi partoprenadon. Oni estas tute libera je elekto de kvanto da paĝoj kaj titolo de la libro. Do, oni povas legi inter 1 paĝo tage kaj “n” paĝoj tage.

La celo estas 500 partoprenantoj. Nun estis 128 el 24 landoj, kiuj entute legis pli ol 12.000 paĝojn, do meze iom pli ol 6 paĝojn tage. Tiom ankaŭ la Nederlandaj esperantistoj povas legi, ĉu ne? Do, aliĝu en la SUMOO-n de januaro en ĝoju la legadon de nia literaturo.

Madzy van der Kooij